

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

1998:2

## Esperantister med på Unescokonferens i Stockholm



*"Esperanto för  
att lära sig  
många språk -  
för att skydda  
alla språk"*

står det på banderollen

## LA ESPERO

### Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694  
Aprilo 1998 • 86-a jarkolekto  
Fondita en 1913

#### Redaktion:

Jan Setréus  
Franko Luin (teknisk redaktör)

#### Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: [espero@esperanto.se](mailto:espero@esperanto.se)

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck, Stockholm

Prenumeration 1998: 170 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)  
[www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

#### Medlemsavgift 1998:

Direktansluten medlem 170 kr.  
Familjemedlem (utan tidning) 75 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 75 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*.

## ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Hemsida: [www.esperanto.se/eldona](http://www.esperanto.se/eldona)

Telefontid: Samma som EsperantoCentro Stockholm.  
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Bertil Nilsson

### Manusstopp den 30/5

#### Manus till *La Espero*

sänds till Jan Setréus

Mörtg. 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden  
(tel./fax 08 - 717 75 67)

*La Espero* estas presata  sur recikligita papero.

## NI PREZENTAS

# Keiko

Mi, kies memprezenton vi nun legas, havas la postenon de sekretario de SEJU kaj nomiĝas Keiko Snarberg. Fakte, mi ĝis nun estis ano de la SEJU-estraro dum ses jarojn, sed tute ne sentas emon fini labori por SEJU. Kontraŭe, nuntempe vere estas interese esti estrarano de nia organizo kaj mi esperas, ke mi povas kontribui per bonaj aferoj.

Oni povas priskribi min kiel 25-jaraĝan studentinon kun ĉefa fako de la japana lingvo. Mi elkreskis en Jönköping sed nun loĝas en antaŭurbo de Gotenburgo, nome Västra Frölunda. Ceteraj kursoj kiujn mi studis estas ekz. soci-antropologio, kultura scienco kaj kursoj rilataj al orienta

Azio. Ekde unu jaro mi studas svedan lingvon kiel duan lingvon, t.s. por instruado al eksterlandanoj. Krom la studado mi vivtenis min per laboro ĉe la sama universitato sezone kun aplikadoj por la akceptado de kursoj.

Por mia libera tempo mi vere deziras, ke mi havus pli da tempo kaj energio por ekz. fari fizikan ekzercadon (aerobikon aŭ kiel ĝi nomiĝas esperante...), naĝi, ludi drumojn kaj gitaron kaj labori pli por la kinejo Folkets Bio kun montrado de filmoj.

Aktuala afero, kiun mi faras estas nia (SEJU) laboro por la Kultura Esperanto-Festivalo aŭguste 1998, kie mi i.a. havas la artistajn rilatojn. Se vi ŝatus kontribui - kontaktu min!

Mi ankaŭ vere ŝatus havi hundon, sed ĉar jam mankas tempo, mi ne scias kiel ebligi tiun aferon... Eble mi devas unue praktiki per la elektronika besto/ludilo "Tamagoĉi"?

## Esperanto ludas rolon en nova sveda romano

En sia fama romano "Bergtagen", Zauberg, Thomas Mann mencias la ideon de esperanto. Malsanuloj en la svisa sanatorio komencas lerni la novan internacian lingvon. Mann rakontas tion kiel ekzemplon pri karakterizaj tempomanieroj.

Tutsame la sveda verkisto Per Holmer volas fari en sia ĵus aperinta romano "Svindell", eldonejo Wahlström & Widstrand.

La "heroo" de la romano revas pri la ideo de esperanto kiel ilo por unuigi kaj paciĝi la mondon. El sia germana hejmurbo li vojaĝas al Parizo en 1914 por partopreni en la esperantista mondkongreso tie.

Sed la saman tagon, kiam la kongreso devus komenciĝi, eksplodas la unua mondmilito. Granda tumulto en Parizo kaj disigo de la kongreso. Sur granda tabulo oni povas legi:

"PRO LA MILITO LA SOLENA MALFERMO DE LA KONGRESO NE OKAZOS".

Ĉiuj provas fuĝi al siaj hejmlandoj. For estas ankaŭ la ideo, ke Zamenhof ricevos la Nobelan pacpremion.

Per Holmer donas kolorriĉan bildon pri la okazintaĵoj ĉirkaŭ la forigita kongreso. Verŝajne li studis la aferon kaj ankaŭ la lingvon esperanto, ĉar liaj frazoj en esperanto estas korrektaj, escepte en la lastaj paĝoj, kiam li forgesas la akuzativon...

Kompreneble oni kiel esperantisto

scivole malfermas la libron. Kaj estas tuj ŝokita de la unua frazo: "Man kan inte svära på esperanto". Kiamaniere la verkisto ekhavis tiun ideon? Jes, ĉar: "Diabolo är en leksak".

Esperanto ne estas la plej grava afero de la romano. Per Holmer volas doni bildon pri Eŭropo dum la jaroj 1914-1933.

La verkisto, naskita en 1951, spite sian junecon jam aperigis sep romanojn, sed "Svindell" estas lia plej granda provo.

Estus interese scii, kiel li kontaktiĝis kun nia lingvo. Lia sinteno al ĝi estas kelkfoje favora, kelkfoje dubema. Ne gravas. Grave estas, ke esperanto havas lokon en nova sveda romano.

Börje Andersson

*Noto de Franko Luin:*

Per Holmer verkis siatempe libron pri la juna sveda anarkisto-esperantisto Einar Håkansson, kunlaboranto de la anarkista revuo *Brand*. Pro iu artikolo en tiu revuo Håkansson estis eĉ kondamnita al malliberejo. Dum iom da tempo li poste laboris kiel presisto ĉe la esperanto-presejo en Parizo, sed revenis al Svedio elrevigita pro la malbonaj laborokondiĉoj tie (laŭ Holmer).

Por verki tiun libron Per Holmer turnis sin al SEF kaj mi povis helpi lin per iom da esperantlingva materialo pri Håkansson.

# Om inte om hade varit...

*Nio hundra representanter för världens alla möjliga folkrörelser – eller icke-statliga organisationer, som det heter officiellt – samlades i Stockholm i mars-april. Där var också regeringsdelegationer från de flesta av FN:s medlemsländer. Unesco höll konferens om "kulturen som maktfaktor" (The power of culture).*

Bland folkrörelserepresentanterna fanns även representanter för Internationella Esperantoförbundet (UEA) och radikala partiet i Italien, som har esperanto på sitt program.

Före konferensen samlades 30 ungdomar från olika länder för att utarbeta ungdomens råd till Unesco och medlemsländernas regeringar vad gäller kulturpolitik. Bland ungdomarna fanns också några esperantotalande.

Samtidigt som regeringskonferensen pågick i Folkets hus i Stockholm pågick ett stort antal "agoror" och "forum", där de icke-statliga deltagarna spelade huvudrollerna. Ämnena var av de mest skiftande art, men alla med knytning till kultur. Den för oss viktigaste agoran handlade om språkfrågan i mellanfolklig samverkan, med deltagande av mycket framstående språkvetare, både esperantister och icke-esperantister.

Agoran sammanfattades med en rekommendation i två punkter. Dels att det ska utredas om FN-systemet och andra internationella organisationer skulle ha nytta av att ett enda språk bleve officiellt brospråk. Dels ska de olika tänkbara språkens för- och nackdelar som brospråk studeras objektivt, varvid kravet på neutralitet ska tillmätas stor vikt.

## För bra för att vara sant

Detta sammanfattning av Unesco-konferensen är naturligtvis alltför bra för att vara sann. Stryk det som står ovan om esperanto, så blir bilden sann.

Men solskenshistorien om esperanto som ämne för en agora i Unesco-konferensen kunde mycket väl ha förverkligats, om bara UEA och dess medlemmar vetat om att konferensen skulle hållas. UEA är faktiskt officiellt erkänd av Unesco som en internationell kulturorganisation.

Nu hände i stället följande: några veckor för konferensen kontaktade det italienska radikala partiet svenska esperantister för att ordna husrum i Stockholm. SEF:s Roland Lindblom kontaktade UEA, som inte kände till konferensen. I hast utsågs tre svenskar, Roland Lindblom, Christer Kiselman och Bengt Nordlöf att representera UEA. Men någon tid för förberedelser fanns ju inte, allra minst att ordna en agora.

Något större utbyte med de italienska radikalerna blev det inte, de var nämligen inte själva esperantister.

Men de syntes, kanske mer än någon annan på konferensen. De lyckade nämligen sätta upp en banderoll i en av samlingshallarna, där esperanto och dess användbarhet lyste över alla under hela konferensen. Var den en av konferensens få organisatoriska missar, att ingen nitisk tjänsteman

från utbildningsdepartementet rev ner den säkerligen otillåtna propagandan? Men vi esperantister blev lika glatt överaskade varje morgon.

Bengt Nordlöf

Bilden på sid. 1:

Roland Lindblom läser i Unesco-salen inte utan förtjusning om esperantos möjligheter  
(Foto Bengt Nordlöf)

ESPERANTOFÖRBUNDETS ÅRSKONGRESS  
STOCKHOLM 15-17 MAJ 1998

## Kongressprogram

### Fredag

18.00 "Bonveniga vespero" i Hälsans hus, Fjällgatan 23 A  
- 23.00 Diverse programpunkter fr.o.m. kl. 19.00.  
Te och tilltugg.

### Lördag

09.00 "Akceptejo" öppnar i Fogg's Hotel, Nacka  
10.00 Eldona Societo Esperanto – årsmöte  
10.30 Kaffe  
11.00 ILEI – årsmöte  
SEJU – årsmöte (ev. fortsättning efter lunch)  
12.00 Lunch  
13.00 Kongressens öppnande  
14.00 Esperantoförbundets årsmöte  
15.30 Kaffe  
16.00 Föreläsning av Adolf Burkhardt  
18.30 Middag  
20.00 Musik och dans till toner av kvartetten "Delicados"  
med bl.a. Kaj Stridell

### Söndag

09.00 Diskussion: "SEF kaj Kampanjo 2000". Roland Lindblom inleder.  
10.00 Kaffe  
10.30 Föreläsning av Andrzej Pettyn: "Novaj vortoj en la ŝanĝiĝanta mondo"  
12.00 Kongressens avslutning  
12.30 Lunch  
13.30 (Ev.) Utflykt till Skansen.  
Anmälan under kongressen.

# La Esperanto-kursoj en 1997

*Ekde 1998 ni jam instruis studantojn el 38 nacioj en niaj Esperanto-kursoj. Dum ĉi-aŭtuno partoprenis anoj de ses nacioj – Svedio, Danio, Norvegio, Zimbabvo, Japanio kaj Ĉinio. Ĉiusemajne oni studas Esperanton 20 lecionojn enklase kaj 4 lecionojn en la lingvolaboratorio. La instruado estas tute en Esperanto. Jam post 2-3 semajnoj la studantoj povas fari etajn rakontojn kaj skribi eseetojn, kaj jam post monato ili interparolas kun studkamaradoj ĉe la manĝotablo.*

Nia ĉino Basheng Chen montris ĉe kunveno al mirigitaj lernejoj kaj en la Sveda Televido, ke li post kvar monatoj flue povas paroli Esperante. Mi vere bedaŭras ke lernejoj aŭtoritatoj kaj politikistoj ne volas informiĝi pri tio.

Esperanto povus propedeŭtike ludi grandegan rolon en lingva lernado, kiel estas montrite diverslerneje. En ĵusaj testoj en tri eŭropaj landoj montriĝis, ke Esperantostudentoj averaĝe sukcesis je 30-35 % pli bone ol siaj kamaradoj pri la germana kaj la angla.

En decembro la Sveda Televido 2 vizitis nian fakon kaj faris programon pri la studado kaj la kursanoj. Poste oni montris la programon en Ĉirkaŭ la Lando kaj ĥomoj el la plej norda parto de Svedio ĝis Kopenhago en Danio sude skribis al ni. La intereso por Esperanto kaj niaj kursoj grandigis pli kaj pli, certe multe dank' al la 5 programoj pri Esperanto en la Sveda Edukradio, senditaj plurfoje en diversaj televidaj kanaloj.

La programoj estis parte verkitaĵoj en nia fako kaj ankoraŭ haveblas de nia fako la kajereto Komplemento [du poŝtmarkoj por kajereto kaj afranko]. Ĝi enhavas multe da informo pri la lingvo kaj la ideo, historio, intervjuoj, organizo, kantado, renkontiĝoj, kongresoj, gazetoj, literaturo kaj aliaj interesaj. Ĝi estas bona inform- kaj varbmateriale i.a. por lernejoj.

Eksstudento Robert Smeds, mia asistanto dum la tuta semestro, instruis kaj helpis min bonege pri diversaj praktikaj aferoj. Lia kajereto Mil Gravaj Vortoj en Esperanto, kiu i.a. bone enlistigas la trans- kaj netransitivajn verbojn, estas studinda.

Parolante pri verkado, mi ankaŭ volas mencii la laboron, kiun faris dum la studsemestro Cliff Weinmann. Li bele tradukis poemojn de la svedaj verkistoj Erik Johan Stagnelius kaj Karin Boye.

Tri el la Esperanto-klaso ankaŭ instruis 2 lecionojn semajne al aliaj grupoj – Antonia Bernhard pri vegetara kuirado, Helen Oldhage pri desegno kaj Robert Smeds pri jonglado. Li tiel bone sukcesis entuziasmigi studentojn el diversaj klasoj, ke oni vidis jonglantojn ĉie en la lernejo. Kelkaj el niaj partoprenantoj ankaŭ vizitis aliajn klasojn por informi pri Esperanto. Fakte la tuta Esperanto-grupo tiel afable kaj instige agis, ke multaj elektis

Esperanton kiel kromfakon.

Nia rektoro Anders Hellgren mem laŭdis la laboron de la Esperanto-fako kaj petis min paroli pri Esperanto ĉe la fermo de la studsemestro. Li ankaŭ alvokis la studentojn al la scenejo por disdonado de diplomoj pri la lerneja Internacia Ekzameno, kaj fine la grupo kantis "Mi Deziras Propran Lunon" de la konata sveda muzikisto Ted Gärdestad. Bele tradukis la kanton Hans Oldhage, partoprenanto en la Esperanto-klaso. Inda deĵarjubileo por la Esperanto-fako.

La lerneja Internacia Ekzameno estas propedeŭtika al la UEA-ekzameno. Ĝi enhavas antaŭteston gramatikan, aŭskultadon, eseoskribadon kaj la konversacia ebleco estas kontrolita dum 8- aŭ 16-semajna studado en la lernejo. Grandparte ĝi estas samnivela kun la UEA-ekzameno, eble la aŭskultada ekzerco iom pli facilas. Multaj el niaj eksstudentoj ekinstruis post ĉi-tiea ekzameno, kiel ekzemple Ole Therkelsen en la dana kursejo Klint kaj en multaj kontinentoj, Andrea Forman kaj Sara Karlsson dum po ses monatoj en Bona Espero en Brazilo, Ros-Mari Refai en la kursejo en Lesjöfors, Ralf Fröhlich en multaj TEJO-kunligoj diversloke en la mondo.

Multe da studentoj el la tuta mondo aliĝas al niaj kursoj, sed preskaŭ ĉiuj azianoj kaj afrikanoj malsukcesas ricevi vizon. Mi volas pli klare informi al la svedaj ambasadoj kaj la sveda Invandraverket, ke ne nur temas pri efika lingvoinstruado sed ankaŭ vere serioza, internacia edukado por kompreno, toleremo kaj paco - edukado, nun konata en ĉiuj kvin kontinentoj. Svedio povus gajni eĉ pli bonan reputacion, permesante al studentoj el la tuta mondo studi en nia lando.

Studentoj el Norvegio, Danio, Finnlando kaj Islando rajtas ricevi monpagon por la Esperanto-studoj en Karlskoga Popola Altlernejo. La studapogo kovras grandan parton de la kostoj. Bonvolu kontaktiĝi kun:

**Nordens Folkliga Akademi**  
Box 120 24  
402 41 Göteborg  
Svedio  
tel. +46 - (0)31 - 69 56 00  
fakso +46 - (0)31 - 69 09 50

La eksstudento Viljo Mentu kune kun profesia filmisto lastjare faris videofilmon pri Esperanto en la Popola Alt-

lernejo de Karlskoga. Ĝi estis ellaborata samtempe kiel la radioserio de la Sveda Edukradio kaj ricevis la saman nomon Esperanto - Lingvo kaj Ideo. La 25-minuta video nun estas preta por reklama uzado en lernejoj, kluboj, kursoj kaj renkontiĝoj. Ĝi kostas 275 kronojn kaj aĉetebblas pere de nia Esperanto-fako.

## Lernolibroj kaj kasedoj verkitaĵoj ĉe la Esperanto-fako

*Egaleco kaj Paco per Esperanto* / por komencantoj; tekstoj, ekzercoj, gramatikaĵoj, vortlisto, solvoj  
*Ekparolu Esperanton!* / paroligaj ekzercoj - komencantoj, daŭrigantoj

*Ludoviko Zamenhof* / daŭriga lernolibro; tekstoj, ekzercoj, solvoj  
*Sascha* / daŭriga lernolibro pri studento ĉe Karlskoga Popola Altlernejo; ekzercoj, solvoj  
*Tri Studentoj* / rakonteto pri Sherlock Holmes, tradukita de Hanna Pettyn

*Esperanto - Lingvo kaj Ideo* / 5 kasedoj en la sveda por la Sveda Ŝtata Edukradio -96

*Informo kaj lingvotesto* / en la sveda, komplemento al la Edukradia serio

*Esperanto-gramatiko* / por svedaj studentoj

*1000 Gravaj Vortoj en Esperanto* / vortlisto por komencantoj, verkita de Robert Smeds

*Trifolio* / kasedo kaj kantareto; kantas tri studentinoj de la Esperanto-fako

*Kantu Kune* / kantas Andreo kaj Nata Berce; kasedo kaj kantareto bonegaj por kunkantado

*La Vivo de Zamenhof* / pupteatraĵo videokasede; premiita ĉe UK en Bergeno 1991

*Studado en Karlskoga Popola Altlernejo* / videokasedo de Georgo Kustos

*Lingvo kaj Ideo* / video pri Esperanto en Karlskoga Popola Altlernejo de Viljo Mentu

Adreso:

**Karlskoga Popola Altlernejo**  
691 24 Karlskoga  
Svedio  
tel. +46 - (0)586 - 646 14, 646 00  
fakso +46 - (0)586 - 646 22

Lars Forsman

## PREMIO LUMO AL SEF

La Espero ĵus ricevis la informon, ke Sveda Esperanto-Federacio gajnis la unuan Premion "Lumo", kiu honoras "tiujn paĝojn en la interreto, kiuj plej bele kaj efike servas al la Esperanto-komunumo. Gajnantoj de la premio agnoskiĝas kiel la 'plej bonaj' el la interreta Esperantujo."

La premio estas kreita en 1998 de "la Virtualujo" kaj funkcias tiel, ke la uzantoj de interreto proponas la plej bonan paĝon. Evidente la informejo de SEF estis proponita de plej multaj.

## Forsman och påven årets esperantister

Den internationella esperantotidningen *Heroldo* utsåg i sitt första nummer i år årets händelse 1997 i esperantovärlden. Det blev etablerandet av Esperanto-Gården. I samma artikel utsågs också årets esperantolärare: han heter Lars Forsman.

Vidare utsågs 1997 års esperantist. Det blev påven, inte bara för att han årligen läser nyårshälsningen på esperanto utan för att han också gav audiens för en grupp kristna esperantister.

## Pli ol dekmil subskribintoj

La subskriboj por la Manifesto de la Esperanto-Movado, lanĉita en la UK en Prago en 1996, eniris la duan dekmilon. Fine de novembro 1997 la sumo nombro estis 10 391. La Centra Oficejo de UEA daŭre akceptas subskribojn kaj disponigas por tiu celo presitajn listojn (por 20 nomoj) kaj poŝtkartojn (por 4 nomoj).

UEA baldaŭ eldonos studlibreton, kiu enhavos po unu artikolon pri ĉiu ero de la Manifesto. Ĝia celo estas pliprofundigi la konojn de la Manifesto. Krom por memstudado ĝi taŭgos tre bone kiel bazo por diskutoj en kluboj, konversaciaj rondoj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj.

CO de UEA

## Kroata Esperanta monero

Post Polio kaj Kubo Kroatio estas la tria lando, kiu havas "Esperantan" moneron. Ĝi ne estas produktita nur por kolektantoj, sed ĝi cirkulas kiel regula pagilo en la ŝtato!

Pluraj esperantistoj vizitis jam specialan giĉeton de Popola Banko de Kroatio por interŝanĝi la kroatan monon kunao al speciala "Esperanta monero" eldonita okaze de la Unua kongreso de kroataj esperantistoj. Estas agrable havi la Esperantan moneron en la poŝo, per kiu eblas laŭplaĉe ankaŭ pagi.

La giĉeta monero de la Popola Banko estas multe vizitata – aperis ne nur Esperantaj sed ankaŭ pliaj du novaj moneroj de 25 kunaoj. Tial

enviĝas antaŭ la giĉeto multaj kolektantoj por provizi siajn kolektojn por nove aperintaj moneroj.

La vorto "Esperanto" tial lastatempe ofte audiĝas en ĝis nun nekutima medio rilatanta al – moneroj.

Interesitoj povas mendi ĝin kontraŭ 20 guld. kun aldonaj 5 guld. por la poŝtkostoj.

Informas  
Kroata Esperanto-Ligo  
HR-10000 Zagreb,  
tel. /fakso +385-1-4810152,

Spomenka Štímeć

## Internacia Csehmetoda kurso

Dum la tagoj 25 ĝis 30 de julio 1998 (ses tagojn), okazos en Valencia (Hispanio) rapida Esperanto-Kurso por komencantoj kaj progresintoj, laŭ

Cseh-metodo. La profesoro estos la ege prestiĝa internacie en tiu metodo s-ro Anton Zacharias, el Slovakio. La klasoj okazos ĉiumatene, ekde la 9-a ĝis la 13-a horo. Postagmeze estos libera tempo por viziti la belajn plaĝojn de Valencia, kaj sunbruliĝi. Laŭ bezonoj kaj sugestoj, eblas aranĝi postagmeze kulturajn vizitojn aŭ distrajn programerojn. Ankaŭ, se estas kandidatoj, okazos seminario pri la Cseh-metodo, ĉefe por instruantoj.

Fine de la kurso, povas okazi, por tiuj kiuj tion deziras, komuna vojaĝo al la UK en Montpellier (Francio).

Prezo de la kurso (ne inkluzivas loĝadon aŭ manĝadon): 6.000 hispanaj pesetoj (ĉirkaŭ 40 usonaj dolaroj).

Interesiĝantoj kontaktu:  
Augusto Casquero de la Cruz  
Avenida Burjasot, 29, A-31  
ES-46009 Valencia  
HISPANIO

Telefono: + 34 (9) 6 3401369

Fakso: + 34 (9) 6 3849616

Retpoŝto: a-casquero@redestb.es

## Denove en Kvinpetalo

En 1992 ni por la unua fojo partoprenis esperanto-kurson en Kvinpetalo, la franca esperanto-centro en Bourges, kaj jen ĉijare en mezo de februaro ni finfine revenis tien.

La didaktitaj kontribuoj de la revuo "Literatura Mondo", de E. Privat kaj W. Auld estis la temoj de la kursoj gviditaj de Claude Gacond. La staĝoj estis interesaj kaj je alta nivelo, kiel kutime. Krome, ni havis la eblecon eĉ legi "Literaturan Mondon" surloke, ĉar tuta kolekto de la revuo troviĝas en la biblioteko de Kvinpetalo.

Kompreneble, ni ĝuis la amikecan

etoson regantan en Kvinpetalo, bonstuman manĝadon kaj ĉiaman zorgon de Suzanne Bourrot – unuvorte ni multflanke profitis de nia restado tie. Forirante hejmen ni decidis ne atendi denove 6 jarojn, sed reveni pli frue, ĉar la programo estas tiel varia, ke oni povas partopreni staĝon sufiĉe ofte kaj ĉiam rehezmiĝi pliriĉigitaj de kono de nia lingvo kaj, ne malpli grave, pri kies evoluo kaj historio.

Anita Bergh  
Agneta Emanuelsson



Sur la bildo: Norah Brown, Britio, Johano Rapley, Bouresse, George Lagrange kaj Susann Bourrot, skiuj gvidas Kvinpetalon. Malantaŭe la instruisto Claude Gacond, Kimie Markarian, Britio, Helga Rapley, Bouresse, Marie-Therèse Lloancy. Antaŭe: Andrée Gacond, Svislando, Agneta Emanuelsson, Svedio kaj Dinah Mackenzie Peers, Parizo.

Fotis Anita Bergh

# 4000 km stafetmarŝo

*La "Marŝo-Grupo" de la loka "Libertempa Fervojistaj Organizo" el Udine, Italio, planas ĉi-somere stafetmarŝon je pli ol 4000 km, kiu kunligos Adriatikan kaj Norvegan Maron.*

Tiun ĉi kuradon plenumos dum 16-17 tagoj proksimume 20 atletoj, kiuj marŝos alterne kaj senhalte dum 24 horoj kaj je kia ajn vetero. Ili startos el Lignano Sabbiadoro (Italio) la 25-an de julio kaj – tra Aŭstrio, Germanio, Svedio, Finnlando – atingos Nordan Kabon en Norvegio, supozeble la 10-an de aŭgusto.

Karavano de 5 aŭ 6 loĝveturiloj asistos la tutan teamon, rilate al loĝado de atletoj, oficialaj komisaraj, trejnistoj, ĵurnalistoj kaj sanitara servo. Krome, akompanos la karavanon aliaj neoficialaj veturiloj. Sponsoras la aferon du gravaj italaj industrioj lokitaj en la Regiono Friulo-Julvenetio: Danieli kaj Zanussi. Ĉi lasta havas industriajn ligojn kun la sveda Electrolux.

Kompreneble, tiu stafeto "De bordo al bordo" starigos grandan reklam-impreson, ĉar la organizantoj intencas kiel plej eble grandskale disvastigi la aferon, kiu vere indas eniri la Guinness-rekordojn.

Eĉ se la marŝantoj ne scipovas Esperanton, nia grupo – sekcio de la sama "Libertempa Fervojistaj Organizo" – opinias ĉiamaniere apogenda tiun "nekredeblan aventuron". Ĝi sendube altiros atenton kaj scivolemon de la publiko kaj estus por ni ekspluatenda ŝanco por proponi ekster median mesaĝon pri internacia amikeco kaj solidareco kunligitaj strikte al sporto. Tiamaniere eblas ankaŭ kontribui al Kampanjo 2000 per aktiva al-ekstera agado laŭspirite de la Praga Manifesto.

Niaopinie, tiu apogo povus doni jenajn avantaĝojn:

a) vidigi la Esperantistaron ekster nia medio;

b) altiri atenton kaj plibonigi nian bildon subtenante sportan, sindoneman, neprofitan agadon;

c) pruvi ke Esperanto efike utilas internacie;

d) kaj, laste sed ne balaste, doni iom da memfido al ni mem, per kunordigo de komuna agado.

Niaflanke, ni zorgos starigi efikan kunlaboradon kun la organiza grupo de tiu stafeto, celante eblecon reklamadi Esperanton surekstere de la veturiloj.

Por la Esperantistaj grupoj, lokitaj laŭlonge de la itinero, jen kelkaj proponoj:

1 Liveradon al lokaj amas-komunikiloj (radio- kaj TV-stacioj, ĵurnaloj, revuoj ktp) de artikoloj kaj

komunikadoj pri tiu ĉi stafetmarŝo.

2 Organizon de bonveno (eble oficiala) en la urboj kaj urbetoj, kiujn la karavano trairos. Mapojn, kun detala itinero kaj eblaj horoj de traveturado, ni provizos al tiuj kiuj preta kunlabori kaj anoncos sin.

3 Organizon de kunmarŝo aŭ eble kunbiciklado laŭlonge de kelkaj kilometroj, fare de lokaj sportaj grupoj.

4 Ni klopodos doni al la karavano mesaĝojn por la urbestroj de ĝemelaj urboj kaj por la prezidantoj de lokaj esp-grupoj kiuj troviĝas laŭlonge de la itinero.

5 Organizon de renkontiĝoj ĉe la limoj, kiujn la karavano transpasos, fare de diverslandaj Esperantistoj. Precipe inter svedaj kaj finnaj kaj norvegaj por atesti amikec-sentojn kaj atentigi pri la bezono faliĝi ne nur la limajn, sed ĉefe la lingvajn barojn, tute senkonsidere de la politika flanko.

6 Amasan ĉeeston dum la alveno de la marŝantoj al Norda Kabo, kie certe okazos ceremonioj, por ricevi apartan mesaĝon de nia grupo kaj de itala Esperantistaro.

Kompreneble, ĉiuj aliaj iniciatoj kaj sugestoj, kiujn la loka bonvolo kapablos eltrovi, estos bonvenaj.

La itinero (kiu tamen estos konfirmata) veturos trans: Udine - Tarvisio (Italio) Salzburg (Aŭstrio) Straubing - Weiden in der Oberpfalz - Treuenbrietzen - ĉirkaŭurbo de Berlin - Sassnitz (Germanio) Trelleborg - Smedjebacken - Piteå - Karesuando (Svedio)- Alta (Norvegio).

Esperable, ni kapablis prezenti sufiĉe klare tiun ĉi aferon: sufiĉe da tempo estas je nia dispono por bone prepari lokajn agadojn, kvankam tuja eklaboro nepras, kaj ni esprimas la deziron trovi efikajn kaj taŭgajn reagojn, kun peto propagandi kiel eble plej multe tiun ĉi iniciaton.

Bv. kontaktigi kun nia grupo:

poŝte: Nova Espero Friuli  
c/o DOPOLAVORO FERROVIARIO  
via Cernaia, 2

IT-33100 UDINE - Italio

fakse: +39 432 52 21 79,

adresante al Giuseppe Valente -  
Informado - UDINE

retpoŝte: nored@iol.it

Giuseppe Valente

## Nu blir det kurs även för barn

Årets sommarkurs vid Esperanto-Gården börjar den 9 juni kl 13, alltså något tidigare än vad som skrivits i inbjudan. En nyhet för året är att det nu också blir en kurs för barn. Föräldrar som vill läsa esperanto själva kan alltså lugnt ta med de yngre. Eller varför inte mor- och farföräldrar?

Vad som däremot inte är någon nyhet är den höga standarden på lärarkrafter och därmed på undervisningen. Alla lärarnamn är dock i skrivande stund inte helt klara. För vuxna blir det nybörjar-, fortsättning och konversationskurs.

Utom lärarna väntas också en internationellt känd kulturpersonlighet och musiker till Lesjöfors.

Kursen pågår under tio intensiva

dagar med undervisning, utflykter och kulturarrangemang.

Den börjar som sagt den 9 juni och avslutas kvällen före midsommarafon, alltså den 18 juni.

Priset för måltider och del i dubbelrum är 2100 kr, i tre- eller fyrbäddsrumsrum 2000 kr. I tält eller husvagn blir det ännu billigare.

Anmälan sker enklast genom inbetalning till postgiro 98 90 65-8, Esperanto-Gården. För ytterligare upplysningar skriv till

Esperanto-Gården  
680 96 LESJÖFORS

eller faxes till 0590-30309. Det går också att skicka e-post till [egarden@esperanto.se](mailto:egarden@esperanto.se)

# Över 20 "patronoj" i Esperanto-Gården

## MEDARBETARE SÖKES!

Den 10 - 16 augusti kommer programdelen för Kultura Esperanto-Festivalo (KEF) för första gången att vara gratis. Anledningen till detta är att KEF har fått stöd från Europarådet. För att KEF skall bli en riktig succé behövs även hjälp med praktiska uppgifter. Om du har tid och lust att hjälpa till med nedanstående uppgifter, så hör av dig till Janko Luin (janko@esperanto.se), Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö.

Vi behöver följande:

- Diskjockey
- Svenskälärare (på esperanto)
- Ansvarig för barnaktiviteter
- Ljud- och ljusansvarig
- Kafépersonal

Är du intresserad av att bidra till programmet som artist eller kursledare (t ex teater, foto, gitarr, teckning, skrivverkstad m m), kontakta Keiko Snarberg (kesn0001@student.gu.se), Briljantgatan 12, 421 49 Västra Frölunda.

De svenska esperantisternas egen kurs- och konferensanläggning Esperanto-Gården i Lesjöfors ägs i form av ett kooperativ eller ekonomisk förening. Det betyder att man blir medlem och köper andelar, en mer demokratisk form än att bilda aktiebolag. I kooperativet har en medlem en röst.

Andelarna är på 100 kronor och det behövs många andelar för att kooperativet ska kunna färdigställa den egna fastigheten så att den blir både ändamålsenlig och energisnål. Man får lösa obegränsat antal andelar.

Den som vill och kan stödja Esperanto-Gården med minst fem tusen kronor - i andelar eller gåvor - får hederstiteln Patrono.

Hittills (i mitten av april) har 22 enskilda och föreningar blivit Patrono. De är Harald Andersson, Lesjöfors, Märtha Andreasson, Göteborg, Sten Broman, Skövde, Malmö Esperantoförening, Falu/Borlänge Espe-

rantoklubb, Åke Magnusson, Hagfors, Carl-Erik Ohlsson, Skövde, Britta Rehm, Göteborg, Svenska Esperantoförbundet, Kungälv's esperantoklubb, Skövde Esperantoklubb, Petro Rulofido, Nederländerna, Svenska Esperanto-Institutet, Olle Olsson, Lund, Kristliga Esperantoförbundet (KELI), Lars Forsman, Karlskoga, Svenska Arbetsesperantoförbundet (SLEA), Boo-Mee Kim-Lindblom, Haninge, Omnibus Typografi, Tyresö, Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU), Olav Björnsrud, Kongsberg, Norge, och Solveig Bertilsson, Skövde.

Listan är som synes ganska lång och Esperanto-Gårdens styrelse uttrycker sin tacksamhet till samtliga patronoj. Men som framgår på annan plats behöver listan bli än längre. Styrelsen vill särskilt uppmana de klubbar som ännu inte haft frågan uppe på dagordningen att överväga att bli Patrono.

## Ne plu lamentu!

Dum tuta mia vivo en la esperanto-agado, iom pli ol 50 jaroj, mi aŭdis la lamenton pri mankanta mono:

"Se ni havus monon! Se ni posedus propran ejon aŭ domon, kiu povus funkcii kiel esperantocentro por nia lando. Centro por instruado, kunvenado, rekreado. Se ni povus indiki al videbla institucio el brikoj kaj betono, kiu montras, ke esperanto ne nur estas nebulaj fantazioj. Sed la mono mankas. La esperantomovado ĉiam estis kaj restos malriĉa."

### NUN, KARAJ AMIKOJ, NUN EN LA JARO 1998, NUN NI POSEDAS TIUN DOMON!

Ĝi ne staras ĉe Norrmalmstorg, Götaplatsen aŭ alia prestiĝoplena loko. Ne, multe pli bele kaj bone, ĝi situas en bela Värmland, en Lesjöfors.

Sed ĝi estas konstruita el brikoj kaj betono. Ĝi estas posedajo de la sveda esperantomovado pere de fabelecaj kondiĉoj. Ĝi estas nia sen pezaj rentoj kaj amortizoj. Ĝi bezonas iom da prikonstruadoj kaj instaladoj por plene

funkcii, sed por tio ni eĉ ricevos belan sumon, se ni, la posedantoj, estas pretaj fari nian kontribuon.

### NUN, KARAJ AMIKOJ, NUN EN LA JARO 1998, NUN EKZISTAS MONO EN LA SVEDA ESPERANTOMOVADO!

En pluraj sufiĉe profundaj fontoj ekzistas la bezonata kapitalo. Mi estas sufiĉe informita pri la ekonomio de la sveda esperanto-agado por tion emfaze diri. Respondecaj estraroj povas indiki al statute fiksataj celoj, sed kiu specifa celo ne povus profiti el tiu ĉi komuna entrepreno?

Pri la supre aludita mono ricevbla: du trionoj de propra kapitalo donas la trian trionon el gubernie kanalizitaj EU-apogo. Ĉu ni rajtas malakcepti tion? Mi min direktas ne al SLEA, KELI, SEF, al tiu aŭ alia institucio, mi min direktas al la sveda komuna esperanto-agado. Hodiaŭ estas la ora momento.

Birger Viggen

## Frivilliga krafter välkomna till Lesjöfors!

Under den tid Esperanto-Gården fungerat som kursgård och vandrarhem har det hänt mycket. Stora insatser har gjorts av esperantister på många sätt: köp av andelar, gåvor, frivilligt arbete, ideella insatser från styrelse och "vår personal på plats", genomförande av kurser, seminarier, kongresser och mycket annat. Det är fantastiskt att så mycket har kunnat åstadkommas, trots att ingen varit anställd.

Vi får inte glömma dessa insatser utan låta påverka alla oss esperantister till att göra en insats av något slag. Det behövs mer pengar och många timmars arbete. Efter några år kommer vi alla att vara stolta över denna kursgård, som ju bl.a. utnämndes till "årets kulturhändelse 1997 inom esperantovärlden" i tidningen *Heroldo*.

En unik kursgård håller på att skapas men det räcker inte med att beundrande titta på. Vi behöver dig nu! Ring till Lennart Svensson 0590 - 309 09 och fråga vad du kan hjälpa till med. Bostad och mat behöver du inte bekymra dig under din vistelse.

Vi välkomnar esperantister, pigga ungdomar, pensionärer eller överhuvudtaget människor som stöder esperanto-iden. Just nu är Esperanto-Gården i stort behov av frivilliga krafter som kan, t.ex.:

- göra elektriska installationer
- mura
- snickra
- dra rör
- måla
- bygga upp en enkel administration
- eller överhuvudtaget arbeta praktiskt.

Du är hjärtligt välkommen att ringa Lennart Svensson 0590-309 09 Bengt Nordlöf 08-93 41 70 Carl-Erik Ohlsson 0500-48 55 46 eller någon annan i styrelsen.

Karlskoga, 13 april 1998

Lars Forsman

# Kial skribi pri malaperantaj kulturoj?

## ĈU VI KREDAS?

### En mensmalsanulejo 1

En mensmalsanulejo unu viro, kiu kredis esti muso, pliboniĝis kaj elskribiĝis. Sed li restis kaj sidis apud la pordo kaj ne volis eliri. Lia kuracisto demandis la kialon.

Paciento: Ĉar tie troviĝas kato.

Kuracisto: Tamen vi scias, ke vi ne plu estas muso.

Paciento: Jes, sed la kato eble ne scias tion.

### En mensmalsanulejo 2

Kelkaj pacientoj atendis sian vicon en akceptejo. Flegistino venis kaj vokis.

–Hundfekaĵo Lee! Sed li ne respondis kaj la flegistino demandis, kial li ne respondis.

–Mi ne estas Hundfekaĵo Lee. Mia nomo estas Napoleono.

Ridante la flegistino demandis:

–Ĉu? Kiu diris? –Hieraŭ Dio tion diris al mi.

Tiam subite apud viro ekstaris kaj laŭte diris:

–Kiam mi diris tion? Stultulo!

*Trad. Falpupeto*

En *La Espero* 1998:1 aperis la sesa resumita "etnografio" de popolo, tiam pri nordamerika popolo. Per tiu priskribo mi finis rondiron ĉirkaŭ la terglobo, vizitante ĉiujn kontinentojn, se oni konsideras Eŭropon kaj Oceanion kiel kontinentojn anstataŭ respektive Eŭrazio kaj Aŭstralio, Nordkaj Sudamerikon kiel malsamajn kontinentojn kaj neglektas Antarkton. El etnografia vidpunkto la menciita difino de kontinentoj estas racia. Verŝajne la plej multaj el la priskribitaj popoloj estis nekonataj eĉ al nia erudicia legantaro. Tamen mi insistis/insistos informi pri ĉi tiuj minoritataj popoloj, ĉar mi opinias, ke urĝas almenaŭ konigi pri ilia ekzisto antaŭ la perejo. Tiu leganto kiu atendas la tutan kolekton da etnografioj atendas vane, se nia revuo ne transvivos la tutan trian jarmilon, ĉar oni nombris ĝis sesmil popoloj/lingvoj en la mondo. Kelkaj sciencistoj kredas ke duono restos post 75 – 100 jaroj, aliaj kleruloj asertas ke jam post jardeko duono estos malaperinta.

### Lingvoj kaj popoloj

La identigo de popolo kun lingvo ne estas senescepta. Troviĝas pluraj popoloj kiuj parolas la saman lingvon, kaj kontraŭe ununura popolo kiu havas plurajn lingvojn, sed kutime la lingvo estas kriterio de etna identeco. Oni tradicie utiligis lingvajn karakterizojn studante etnajn interligojn kaj disvastiĝon de kulturoj. Kelkfoje oni troigis siajn eltrovojn konkludante strangajn rilatojn el hazardaj koincidoj.

Dum la lastaj jaroj oni evoluigis alian rimedon por scienca esploro de (antaŭ)historiaj kulturoj, t.e. per la DNA (desoksiribonukleata acido) de la mitokondrioj. Tiele oni ja lastatempe i.a. reviziis la akceptitan teorion pri la laponaj lingvo kaj popolo (rilate al la suomiaj), nun emfazante ties antikvecon.

La antropologoj nuntempe ne ofte teoriumas pri antaŭa migrado de popoloj kaj kultureroj, sed preferas analizi unuopajn kulturojn. En nia malgranda lando malmultaj antropologoj devias de la aprobata skolo. Spite de la malmulto da sciencaj teorioj kiujn produktas antropologoj, publikigis daŭre novaj ofte ampleksaj kaj bonaj etnografioj. Oni tamen rimarkas diferencon kompare kun malno-

vaj etnografioj; preskaŭ ĉiuj popoloj jam influigis de aliaj kaj perdis multon de siaj malnovaj karakterizaĵoj.

### Survoje al ununura kulturo

Oni povus spekulati pri kaj la historio kaj la futuro de niaj kulturoj kaj lingvoj. Kelkaj lingvistoj eĉ profesie aŭdacis proklami ke ĉiuj lingvoj devenas ununuran pralingvon. Aliaj asertas ke la nuntempaj lingvoj devenas de nur dek ses pralingvoj. Laŭ tiu teorio la popoloj kun terkulturo kaj mal-

sovaĝigitaj bestoj subigis la aliajn dum la ŝtonepoko, tiele anstataŭigante la aliajn lingvojn per siaj propraj. Hodiaŭ pluraj minoritataj lingvoj malaperadas, kaj majoritataj naciaj lingvoj estas tre influataj ĉefe de unu specifa lingvo. Oni komparis la homan kulturon kun kultivejo monokultura. Ĝi estas elmetita al la risko malaperi pro unufoja plantmalsano aŭ frosto. Ne hazarde la temo de la UK 1997 estis "Toleremo kaj justeco en multkultura socio".

Jan Setréus

# Ponto inter universalismoj

## Bahaa Esperanto-Ligo 25-jara

La historio de la kontakto kaj kunlaboro inter la movadoj esperantista kaj bahaana respireblas ĝis al la komenco de tiu ĉi jarcento. Aparte prosperaj estis la 20aj kaj 30aj jaroj. Studante la historiajn fontojn oni povas ekhavi la impreson ke siatempe plejmulto de la bahaanoj estis evidentte konvinkita ke Esperanto estos la respondo al la alvoko, kiun ilia profeto, Baha'u'llah, estis direktinta al la givdantoj de la mondo: "Ho membroj de la parlamentoj tra la mondo! Elektu vi ununuran lingvon por la uzo fare de ĉiuj surtere kaj adoptu vi same skribon komunan . . . Tio ĉi kaŭzos unuecon, se nur tion kapablus vi kompreni, kaj montriĝos la plej granda ilo por antaŭenigi harmonion kaj civilizacion, ho ke tion vi perceptu!"

Post la Dua Mondmilito la situacio iom ŝanĝiĝis. Por la bahaanoj aliaj temoj kaj aktivecoj pli gravas. Kaj relativigi la pozicio de Esperanto, ĉar iom post iom pli klariĝis, ke esence la bahaana sinteno al la demando de internacia helpa lingvo estas, en la vorto de la Universala Domo de Justeco, "ke, malgraŭ ĉiuj ĝiaj kvalitoj, Esperanto eble ne estos la internacia lingvo kiu fine estos elektita, kaj ke estas la ideo de internacia lingvo kiun la bahaanoj entuzisame subtenas pli ol iun specifan solvon de la problemoj."

Restis tamen kelkaj fervoruloj ĉirkaŭ precipe Roan Orloff-Stone (al

multaj esperantistoj eble konata per sia traduko de "La Profeto" de Khalil Gibran). Tiuj dum la 57a UK 1972 en Portland iniciatis la fondon de BEL, kiu efektiviĝis jam la sekvan jaron. La Universala Domo de Justeco skribis al la fondintoj: "Via fervoro por Esperanto kiel funkcia internacia lingvo estos, ni sentas, rekompenkata per la eniro en la Kredon far multaj el viaj esperantistaj kamaradoj, kiuj tiel faros la paŝon de universaleco lingva al la pli grandaj universalecoj de unu religio kaj unu homaro."

El tiuj vortoj de la plej alta instanco ene de la tutmonda bahaana komunumo facile dedukteblas ke la rilato inter ambaŭ movadoj foje ankaŭ estas problemiva: Ambaŭ pretendas havi solvon - se ne eĉ la solvon - por esencaj mondaj problemoj. Sekve bahaanoj kaj esperantistoj emas reciproke sin konvinki kaj klopodas tiri la alian sur sian flankon; ofte tamen sen estante preta mem fari paŝon en ties direkto. Alivorte: la historio de la rilato inter ambaŭ movadoj estas ankaŭ karakterizata per unuflanke aktiva propagando en la tendaro de la alia kaj aliflanke relativa rezisto de la bahaanoj esperantistiĝi kaj de la esperantistoj bahaanistiĝi. Pli profunde tion prilumas B. Westerhoff en sia eseo "La movadoj bahaaj kaj esperanta - ĉu suspektemaj inter si samideanoj?", kiu enkondukas la ĵus de BEL, okaze de sia jubileo, eldonitan festlibron.



## LANGLET-AKTIVECO

Pri la kuraĝa kaj sindona laboro farita de Valdemar kaj Nina Langlet en Budapeŝt dum la lasta parto de la dua mondmilito Agneta Emanuelsson informis diversmaniere i.a. dum speciala Langlet-tago kun 400 partoprenantoj kaj en lernejoj. Tiu laboro rezultis en pluraj gelnantaj speciallaboroj. Dank' al ŝia laboro ankaŭ estos preparita speciala Langlet-angulo en la biblioteko de la Ruĝa Kruco en Stockholm. Agneta Emanuelsson ankaŭ gvidis studrondon pri Langlet.

Lige al la kluba hejmpaĝo Henry Thomander ankaŭ informis pri Langlet, laboro kiu vekis internacian intereŝon kaj laŭdon. Katrineholms-Kuriren publikigis artikolon okaze de Langlet-tago ĉe Spetebyhall organizita de Agneta Emanuelsson. Folkbladet kaj Norrköpings Tidningar dufoje publikigis artikolojn pri niaj aranĝoj.

(El la agadraporto de 1997 de La Venkanta Stelo, la Esperantoklubo de Norrköping, el Kelklinie Pri 1998:1 p. 4-5)

## Festlibro eldonita

Post salutvortoj de la prezidantoj de UEA kaj de BEL kaj la artikolo de Westerhoff, kiu foje provokas pri-demandante la radikojn de la esperantismo, dokumentas du eseoj de Lidia Zamenhof ("Kiel mi ekkredis" kaj "La Vojoj de Dio"), kiel trovis sian spiritan hejmon en Bahaismo la filino de la Majstro, kiu sentis sin heredantino de lia inspiro.

Kelkaj esencaj bahaaj tekstoj pri la principo de internacia helpa lingvo kaj pri Esperanto ilustras la bahaan sintenon al la demando. Kaj ampleksa historiografia artikolo prilumas la disvolviĝon de la rilatoj inter bahaanoj kaj la E-movado kaj aparte la disvolviĝon de BEL.

Enkonduko en la originoj, evoluo, bazaj instruoj, celoj kaj aktivecoj de la bahaaj komunumo kaj superrigardo pri la bahaaj literaturo aperinta en Es-

peranto kompletigas la bele ilustritan, 60-paĝan broŝuron, kiu mendeblas kontraŭ IRK aŭ senpage ĉe:

Bahaa Esperanto-Ligo  
P.O.Kesto 500133  
DE-60391 Frankfurt  
Germanio,  
tel./faks. +49-(0)69-95294811  
BahaaELigo@aol.com

## BEL hodiaŭ

...La bulteno de BEL, La BELmonda Letero, daŭre funkcias sole kiel interna informilo entenanta membrarajn informojn, gravajn adresojn, estrarajn komunikojn, novaĵojn pri membraraj aktivecoj en unuopaj landoj kaj erojn el la bahaaj skriboj. Ĝin ricevas aŭtomate ĉiuj BEL-membroj kaj ĝi ne aboneblas. Per ĝi BEL sukcesis krei firman bazon de interna informado sed ankoraŭ ne atingis la staton de la

periodo de "La Nova Tago" en la dudekaj-tridekaj jaroj, kiu estis organo, eble eĉ ĉefe, ankaŭ por ekstera informado kaj por propagando de la Kredo.

La membraro de BEL dum la jaroj iom post iom kreskis ĝis super 400, sed post reviziado komence de la naŭdekaj jaroj preskaŭ duoniĝis - por realtiĝi ĝis aktuale iom pli ol 300 en 52 landoj. Plej multnombros la anoj nun en Germanio (48), Usono (43), Bulgario (35), Rusio (30), Pollando (17) kaj Britio (14).

La Ligo dekomence sin financas per libervolaj donacoj de siaj membroj kaj neniam aplikis kotizsistemon. Krome ĝi ricevas foje subtenojn de unuopaj Naciaj Spiritaj Asembleoj aŭ de aliaj bahaaj instancoj.

BEL dum la lastaj jaroj sin koncentris je aktiva partopreno de la UK-j, foja artikolado en la esperanta gazeto kaj la eldonado de kelkaj gravaj dokumentoj, ĉu komplete kiel en 1986 "La Promeso de Monda Paco" kaj en 1992 "Baha'u'llah" aŭ per resumaj faldfolioj, kiel en 1996 "La prospero de la homaro" kaj "Turnopunkto por ĉiuj nacioj". Ankaŭ BEL foje informas ene de la bahaaj komunumo diversmaniere pri la lingvo kaj movado esperanta.

Grava projekto, kiu devus pretiĝi ĉirkaŭ la nuna 25-jariĝo de la Ligo, estas ampleksa kompilaĵo, iniciatita jam far John Dale, el la bahaaj skriboj kaj kelkaj kromaj fontoj pri la principo de internacia helpa lingvo kaj la uzo de la araba, la persa, la angla, Esperanto kaj aliaj planlingvoj kiel eblaj internaciaj helplingvoj.

Bernhard Westerhoff

## Sommarkurser i Lesjöfors

9 - 18 juni 1998

nybörjarkurser  
fortsättningskurs  
konversationskurs  
barnkurs

Pris för kurs, alla måltider  
och del i dubbelrum: 2100:--  
Med del i tre- eller fyr-  
bäddrum: 2000:--

Anmälan till  
Esperanto-Gården  
680 96 Lesjöfors  
tel. 0590-309 09  
pg 98 90 65-8

Boo Mee Kim-Lindblom

## RECENZO

# Interkona mateno

Sten Johansson, *Interkona mateno, kvar teatraĵoj originalaj. Al-fab-et-o 1996, 15 cm x 21 cm.*

La verkisto Sten J. ricevis premiojn plurfoje en belartaj konkursoj. Sten menciis pri motivoj de siaj unuaj dramoj: Ekzerci sian esprimkapablon estis unu motivo laŭ lia humila esprimo.

Simplaj frazoj kun abunda vortstoko kaj humuraj esprimoj estas la karaktero de Sten Johansson. La frazoj ofte aktivigas cerbumadon de legantoj.

La enhavo estas ĉiutaga vivo de ordinaraĵoj kaj aktualaj nuntempaj tendencoj. Lia ŝerco kutime donas rideton ĉirkaŭ mia buŝo. Se mi aplikas lian manieron en Interkona Mateno, mi proponas uzi la mallongigon UEA por "Uzi Esperanton Amike". Estas ĉarme!

Ĉu estas hazardo aŭ sorto? Tia demando estas eterneca. Laŭ propra volo oni povas decidi aŭ emfazi ĉiujn okazaĵojn por si mem. Nia vivo aspektas problemoplena, sed kiam oni legas dramojn de Sten, tiam oni povas rimarki optimismon de nia vivo. Do ni renkontas "NEPO BENITA"-n.

Je la fino de la 80-aj jaroj komunisma muro forfalas. De tiam la orienta popolo direktas sin okcidenten por serĉi liberecon kaj bonfarton de la vivo, post longa suferado de "kruela subpremado de humanisma valoro". Oni jam aere sentis la skuon kaj tremon de la ŝanĝiĝo en ismoj. Kiam mi

legis SAVBOATO-n, tiam mi kapjesis pro la trafeco de historia fluo.

La personoj en la libro ne forgesas ŝerci en seka kaj nervoza situacio. Ili sur la savboato pripensas solvon de komunika problemoj. Internacian lingvon SOPIRANTO-n unu proponas, kaj alia imagas "sup-iranto"-n. Libera imago, pensado fantazie kaj esperante eble necesas por ilia aŭ nia filozofiumado.

"Ĉia politiko estas blago kaj trompo", unu el ili elbuŝigas, sed B estas optimisto kaj mencias pri la partio: "... pure idealisma, honesta movado, kiu agos sole por la bono de la homaro." Kaj li daŭre, komike emfazas: "Ni solvos ĉiujn problemojn en paco, konkordo kaj interkompreniĝo. Dio donos tagon, Dio donos konsilon."

Nia vivstilo ŝanĝiĝas laŭ modernaj iloj sinsekve, ankaŭ nia pensmaniero. Tamen bedaŭrinde multaj restas en kutimaj pensmanieroj: Oni prefere transdonas kulpojn de si mem al aliaj, oni volas argumenti pli simpatie por tiri aŭ gajni zorgemon, intereson de aliaj, eble por superregi aliajn.

SONLETERE sonas la voĉo avare aŭ komike. Oni tute ne povas eskapi el la kategorio *Vi kaj Mi*. Inter ili okazas amara kaj amora dramoj. Ni povas scenigi ĉion en nia kapo laŭ propra fantazio, kaj povas havi eblecon kolorigi proprajn scenejojn laŭ niaj plenaj spertoj.

Simplaj kaj vortoriĉaj esprimoj eblas kontentigi legantojn. *Humuro* de la verkisto amuzas nin. Legantoj eble renkontos siajn najbarojn aŭ konatojn dum la legado de ĉi dramoj. Rekomendinda libro por komencantoj kaj progresantoj.

# Slango en Esperanto

*Ĉu troviĝas en Esperanto slango? De tempo al tempo oni aŭdas la demandon. Malofte esperantisto sukcesas konfirmi per cito amplekson de slango en Esperanto.*

Ŝajnas, ke oni atente devas serĉi nian slangon por trovi ĝin. Vd ekzemple Bernard Golden (en Esperanto dec. 1991 p.227) kiu mencias ĝin nomante farendajn aldonojn k.s. rilate novan eldonon de PIV. Aliaj samideanoj certe malaprobis pri la strebindeco de tia projekto, ĉar la slango estas malestimata de multaj.

Eble tiuj puristoj agnoskas la kutiman opinion ke la vorto slango havas anglan etimon, kaj ke la angla estas eksterordinare riĉa pri slangaj vortoj. La angle parolantaj siavice kun malica ĝojo povas akuzi skandinavajn kaj francan lingvojn pri la fonto de la vorto slango. En la angla oni ofte kreas slangajn vortojn per la antaŭmeto de la litero *s-*. Tiel oni facile imagas la francan vorton *langue* (lingvo) kiel etimon de la angla *slang* (slango). La vorto slango mem tamen ne estas slango.

## Kiuj parolas slangon?

Ni kutimas nomi vulgaran lingvon ne aprobitan de la "superaj" klasoj kaj precipe ties plenkreskaj membroj slango. La vorto ja validas tiel por ĝenerala lingvaĵo kiel por la jargono de specifaj profesiaj grupoj k.s. La PIV mencias la sekvajn grupojn kiel ekzemplojn; ŝtelistoj, ciganoj, aktoroj, gimnazianoj. Ni ne surpriziĝas pri la manko de universitataj fakuloj en tiu listo. La jargonoj de la teoriaj studfakoj malgraŭ sia ofta malobeo al la normaj leksiko aŭ gramatiko, kaj nekomprenibleco al eksteruloj, estas aprobita de la socio. La samon oni povas konstati pri la fakterminaroj de diversaj profesioj. Sed kiam la lingvaĵo fariĝas vulgara ĝi vekas malaprob.

La slango ankaŭ trovis siajn advokatojn, kiuj emfazas la kreivan karakteron de ĝi. Tiel ekzemple Gösta Bergman skribis ke la knabo parolanta slangon kaj la poeto ambaŭ pravigas siajn neologismojn per la ambicio novigi la lingvon per esprimivaj vortoj (*Slang och hemliga språk*, 1964, p. 69). Alia sveda aŭtoro pri slango evidentiĝas ke ne nur knaboj, sed ankaŭ knabinoj, parolis kaj parolas slangon (*Vrålbedäriskt*, Ulla-Britt Kotsinas, 1994, i.a. p. 47-48). Per citaĵoj ŝi montras ke viroj ofte malestimis la kreivecon de virinoj: "La virinoj havas la reputacion esti pli konservemaj rilate lingvon ol la viroj." (*Otto Jespersen* en Kotsinas p. 34).

## Kiel formiĝas slangaj vortoj?

Slango formiĝas laŭ pluraj malsamaj principoj. Mi jam menciis la antaŭmetitan literon *s-* de la angla, sed mi povas ankaŭ mencii la postmetitan *-y*. En la sveda ni trovas la finaĵojn *-is* kiu ofte premisas mallongigon de la origina vorto.

Alia principo estas la ŝanĝo de la signifo de vorto, ofte celante mokan esprimon, ekzemple kiam aŭto fariĝas ĉaro. Sed la kontraŭo povas ankaŭ efiki kiam la (en pluraj lingvoj) iom arkaika vorto aŭtomobilo anstataŭas la kutiman vorton aŭto.

Metaforoj aperas ankaŭ kiam oni konstruas novan kunmetitan vorton, ekz. kiam higiena papero fariĝas marĉpapero.

La slango ne nepre plivulgarigas la esprimojn. Ankaŭ troviĝas eŭfemismoj kiuj nur aludas la intencitan vorton. En Esperanto oni almenaŭ povus imagi lignaĵiston ĵus martelinte sian dikfingron ekkrii: DIAB... AZO!

Kelkfoje oni tutsimple renversas kelkajn literojn, por krei pli freŝan vorton el eluzita. Permesu min fantazie proponi kontraŭparton de la Internacia Lingvo: La Ternacia Lingvino.

Ĉu troveblas jam en Esperanto slango? Malmultajn vortojn oni fakte povas trovi en PIV. La plej konata slanga vorto en Esperanto estas krokodili, sed la similaj vortoj aligatori, kajmani k.t.p. ne same oficialiĝis. La vorto goĵo, kiu signifas ne-ĵudo, venas de la juda kulturo. La vorton putino (prostituino) oni klasifikas kiel neologismojn, ne slangon. Same pri aliaj vortoj al kiuj oni aldonis la rimarkon "triviale", "familiare" aŭ "vulgare". Eble oni entute ne serĉu slangon en oficiala vortaro, sed en tekstoj influataj de naciaj lingvoj, kiel en NEPIVAJ Vortoj de A. Cherpillod (kiu tradukis la francan *pisse-froid* per fridpisulo). Anstataŭe mi prezentas du versiojn de rakonto en ordinara Esperanto kaj en slanga Esperanto. La slangaj esprimoj estas rektaj tradukoj de vortoj, adapteblaj al Esperanto, el aliaj lingvoj:

## Donjuano eraras

Mi estis preskaŭ sola en la metro trajno. Mi...donjuano...sola! Stokholmo estas tedeĝa urbo. Tiam mi decidis amindumi iun ajn solulinon.

En la centro mi baldaŭ vidis junulinon fumantan cigaredon. Ŝia robo

flirtis, kiam ŝi turnis sian kapon por rigardi min. Mi tuj komprenis ke ŝi estas tedulino.

-Kioma horo estas, mi demandis por ion diri.

Ŝin interrompis la malproksima sonorilo de preĝejo, respondante per siaj dek du batoj.

Ni ambaŭ ekridis. Ŝiaj blankaj dentoj brilis.

-Estas la horo kiam junulo rajtas kisi sian amatinon, mi asertis, penetrante ŝiajn brunajn okulojn.

-Sensencaĵo, ŝi respondis.

Ŝia ruĝa lipstiko allogas mian buŝon, kaj mi penas brakumi ŝin.

-Mia koro sopiregas vin. Mi volas iri al pastro por edziĝi kun vi, mi diras. Ŝi kuntiras la nazon kaj elsnufas: Babilemulo, vi ripetaĉas!

-Adiaŭ, ŝi diras kaj skuas mian manon.

*Jen la slanga versio:*

## Varmega kalsono trafas minon:

Mi estis preskaŭ sola en la socialŝnuro. Mi...varmega kalsono...sola! La kverko estas polva kavaĵo. Tiam mi decidis najlofiksi iun ajn benkvarmigantinon.

En la centro mi baldaŭ vidis tubpinĉilon gasantan ĉerknajlon. Ŝia tombovesto flirtis, kiam ŝi turnis sian burĝonon por lorni min. Mi resalte kuplis ke ŝi estas pneŭopanejo.

-Kion oscedas la biskvito, mi demandis por ion diri.

Ŝin kornblovis la malproksima sonorilo de preĝonesto, respondante per siaj dek du batoj.

Ni ambaŭ ekhenis. Ŝiaj blankaj stiftoj brilis.

-Estas la horo kiam trigambulo rajtas interŝanĝi salivon kun sia hoko, mi asertis, penetrante ŝiajn brunajn lampojn.

-Neĝkaĉo, ŝi respondis.

Ŝia ruĝa minio allogas mian klapon, kaj mi penas klinĉi ŝin.

-Mia tiktakulo lunas vin. Mi volas vagadi al ĉielpiloto por fari nodon kun vi, mi diras.

Ŝi kuntiras la kranon, kaj elsnufas: Orelfleksanto, vi havas paŭspaperon en la panmuelilo!

-Adiaŭ, ŝi diras kaj tremigas mian rastilon.

## KORESPONDI DEZIRAS

Evís Rodríguez Bory estas kubano. Li laboras kiel komputisto en magazeno nomata "Gefianĉdomoj" en la centra parto de la urbo Guantanamo. Li estas 23-jara, ŝatas historion, legadon kaj ekskursojn tra Kubo.

Evís Rodríguez Bory, 15 Norte e/ 5 y 6 Oeste, Edici. 26 - Apart. 162B, Rpto Caribe - CP 95200, Guantanamo, Kubo

Jan Setréus

# Radio Varsovio

*La 4-an de aprilo Radio Varsovio komencis sian 40-an jaron da Esperanto-disendoj. Andrzej Pettyn, estro de la Esperanto-fako kaj preleg-onto ĉe la Sveda Esperanto-Kongreso en majo raportas la jenon pri la programoj:*

EK de la 1-a de januaro iom ŝanĝiĝis niaj frekvencoj en du elsendoj je la 15.30 kaj 22.30 h laŭ la vintra mez-eŭropa tempo. Tio ligiĝas kun la definitiva difektiĝo de unu el la uzataj sendiloj. Oni ne povas ĝin ripari, ĉar ĝi plene eluziĝis. Por aĉeti novajn sendilojn mankas mono. Avantaĝa estas almenaŭ la fakto, ke nia kadra programo semajna, ekzamenita dum kelkaj jaroj, ĉi-foje ne ŝanĝiĝis.

La ĉefaj E-temaj programeroj restis en la samaj elsendohoroj kaj ili ne mallongiĝis. Male – en la ĉiutagaj novaĵ-bultenoj nun pli ofte oni trovas raportojn pri la E-movado kaj lingvaj problemoj en la mondo. Do estas kelkaj kialoj por ĝojo, sed – kompreneble – la ĝojo estos plena, se la aŭdebleco per la restintaj elsendiloj estos minimume kontentiga. Ĉi tion, bedaŭrinde, ni ne povas garantii, sed restas esperi, ke – se oni ne sukcesos kapti la elsendon posttagmeze – tiam eble ĝi estos aŭdebla vespere. Ni forte esperas, ke almenaŭ unu el la 4 elsendiloj je la 22.30 h trovos vian aprobon! ...

## Nia granda peto:

Ĉiufoje kiam vi skribas al ni, tre-tre klare (treege klare!!!) skribu vian adreson; same kiam vi mendas la bondezirojn, ĉar ĉiun salutotan personon ni nepre volas antaŭsciigi per letere pri la dato de la koncerna elsendo. La adreso klare skribita per globkrajono, tajpilo aŭ komputilo faciligas nian laboron. Krome ĉiam sciigu al ni vian adres-ŝanĝon, ĉar lastatempe, bedaŭrinde, tro multe da korespondajoj senditaj al niaj aŭskultantoj – revenis al ni, ĉar oni ne konigis al ni la adres-ŝanĝon ...

## Bondezirkoncertoj

Nian senpagan servon ni daŭrigos lunde kaj marde (rigardu la kadran programon). Do, se vi volas fari plezuron al viaj leteramikoj, samlandaj, samurbaj aŭ samklubaj gekonatoj – utiligu ĉi tiun servon. Tiucele ni sendas al vi niajn mendilojn.

Se vi bezonas pli da formularoj, vi mem povas kopii ilin aŭ petu ĉe ni difinitan kvanton da mendiloj kaj ni sendos ilin al vi ...

La bondezirojn kaj salut-mesaĝojn ni ornamas per E-kantoj el nia arkivo, inter ili troviĝas E-kantoj el la kompakt-diskoj eldonitaj de Vinilkosmo

(Floreale Martorell), "Kajto" kaj kasedoj de Juliano Hernandez – la kantan-ta prezidanto de Kuba E-Asocio, kiujn eldonis la Esperanto-Sekcio de Radio Havano Kubo.

## Aktualaj frekvencoj

De la 26a de oktobro 1997 Pola Radio disaŭdigas kvar E-elsendojn tage:  
06.30 h – nur per satelito  
15.30 h – 41,18 m; 41,99 m; (7285; 7145 kHz) + satelito  
20.00 h – per satelito kaj 41,18 m (7285 kHz) kaj 49,71 m (6035 kHz)  
22.30 h – 41,18 m; 41,27 m; 49,22 m; 49,71 m per mallongaj ondoj (7285; 7270; 6095; 6035 kHz)

La elsendo-horoj estas indikitaj en la vintra mez-eŭropa tempo, kiu validas de la 26a de oktobro 1997!

## Konstantaj programeroj

*Lunde – 15.30 h*

1) novaĵoj; 2) trarigardo de la ĉefurba gazetar; 3) "homoj kaj problemoj" (reaŭdigo de la programero el la pasintsemajna vendredo – 22.30 h)

*Lunde – 20.00 kaj 22.30 h*

1) novaĵoj; 2) aktuala komentario; 3) pola aŭ E-movada temo; 4) koncerto kun bondeziroj

*Marde – 15.30 h*

1) novaĵoj; 2) trarigardo de la ĉefurba gazetar; 3) pola aŭ E-movada temo; Koncerto kun bondeziroj (R)

*Marde – 20.00 kaj 22.30 h*

1) novaĵoj; 2) aktuala komentario; 3) pola aŭ E-movada temo; 4) Esperanto-gazetar (oni prezentas superrigardon pri tion, kion skribas E-gazetoj, E-bultenoj, ktp.)

*Merkrede – 15.30 h*

1) novaĵoj; 2) trarigardo de la ĉefurba gazetar; 3) pola temo; Esperanto-gazetar (R)

*Merkrede – 20.00 kaj 22.30 h*

1) novaĵoj; 2) aktuala komentario; 3) pola aŭ E-movada temo; 4) Familiaj temoj

*Ĵaŭde – 15.30 h*

1) novaĵoj; 2) trarigardo de la ĉefurba gazetar; 3) pola aŭ E-movada temo; 4) Familiaj temoj (R)

furba gazetar; 3) pola aŭ E-movada temo; 4) Familiaj temoj (R)

*Ĵaŭde – 20.00 kaj 22.30 h*

1) novaĵoj; 2) aktuala komentario; 3) pola aŭ E-movada temo; 4) Kultur-temoj

*Vendrede – 15.30 h*

1) novaĵoj; 2) trarigardo de la ĉefurba gazetar; 3) pola aŭ E-movada temo; 4) Kultur-temoj (R)

*Vendrede – 20.00 kaj 22.30 h*

1) novaĵoj; 2) aktuala komentario; 3) pola aŭ E-movada temo; 4) Homoj kaj problemoj

*Sabate – 15.30 h*

1) novaĵoj; 2) trarigardo de la ĉefurba gazetar; 3) Esperanto-ekspreso

*Sabate – 20.00 kaj 22.30 h*

1) novaĵoj; 2) semajnfina komentario; 3) Leterkesto

*Dimanĉe – 15.30 h*

1) kultur-aktualaĵoj (ofte ankaŭ E-temaj); 2) semajnfina komentario; 3) Leterkesto (R)

*Dimanĉe – 20.00 kaj 22.30 h*

1) kultur-aktualaĵoj (ofte ankaŭ E-temaj); 2) Esperanto-ekspreso (R)

Rim.: (R) = reaŭdigo de la samtitola elsendo el la antaŭa tago.

**Andreo Pettyn**  
redakciestro

Pola Radio, Esperanto-Redakcio  
PL-00-977 Varsovio,  
Poŝtfako – 46, Pollando  
telefonnumeroj:  
(+48-22) 6459-358;  
6459-337 (10.00-13.30 h)  
faknumero: +48-22 645-5917  
rezerva n-ro: +48-22-645-5919

**Malmö Esperantoförening**  
**Kronetorpsg 94**  
**21227 Malmö**

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

# Freŝaj ideoj por KEF-98

*Ĉi-jare la Kultura Esperanto-Festivalo, konata sed tamen nova, freŝa sed tamen tradicia, revenos al Svedio. Ne nur konsumi, sed aktivigi estas la celo!*

Pro tio okazos pluraj kulturaj kursoj kaj laborgrupoj, en kiuj la partoprenantoj mem aktivigas kaj kulturumas. Por ĉiuj ŝatantoj de teatro, muziko aŭ literaturo, estas jen la ŝanco fari ion mem, kune kun aliaj.

Kiel vi eble scias, la celo de KEF estas kunigi esperantistojn por ĝui kaj sperti plej diversajn aspektojn de la Esperanto-kulturo. Tradicie, dum pluraj tagoj famaj kaj malpli famaj artistoj prezentas siajn kantojn, teatraĵojn, verkajojn kaj aliajn artaĵojn al entuziasma internacia publiko. Tiel okazos ankaŭ ĉi-jare, sed...

ĉi-jara KEF estos pli ol tio. Nun por la unua fojo, la partoprenantoj povos mem kunagi, sperti kaj lerni en pluraj kursoj kaj laborgrupoj.

Ekzemple, en laborgrupo pri teatra sporto la partoprenantoj improvizos teatraĵojn pri iu donita situacio, konkurse kun alia teamo. Aŭ, oni povas lerni ludi gitaron, aŭ kanti en koruso. Kompreneble estos ankaŭ okazo montri al la aliaj kion oni ĵus lernis. Tiel en KEF la partoprenantoj ne estas nur publiko,

sed aktive kontribuas al la Esperanto-kulturo. Eble eĉ malkovrigos novaj talentuloj!

Jam nun, pluraj famaj artistoj anoncis sian aliĝon al KEF-98. Inter ili estas la fama esperanto-rokgrupo Persone, grupo kiu la unuan fojon publike ludis en KEF '86 en Upsalo. Aliaj famaj artistoj kiuj ĉeestos estas Ĵomart kaj Nataŝa, la kazaha trubadorduopo, konata pro siaj tuŝantaj kaj melankoliaj kantoj. Pliaj artistoj helpos pere de siaj spertoj en la laborgrupoj.

KEF-98 okazos la unuan fojon en la nova Esperanto-domo de Svedio, en la urbeto Lesjöfors. Ĝi troviĝas agrable for de la bruoj kaj malpurajoj de grandurbo, en la verda koro de Svedio. Pli ol iam antaŭe en la historio de KEF, eblos ĝui kulturon kaj naturon dum sama semajno. En la programo estas ebleco malkovri la ĉirkaŭaĵojn laŭlonge de malnova fervojlinio pere de unika veturilo: la drezino. Ĝi estas kvazaŭ biciklo sur reloj, kaj eblas iri per ĝi ekde tuj apud la KEF-ejo. Sed ankaŭ estas aliaj eblecoj malkovri la naturon: perpiede, per ordinara biciklo, aŭ per kanuo sur la abundaj riveroj kaj lagoj.

Stokholmo, en 1998 la Kultura Ĉefurbo de Eŭropo, en kiu ĝuste dum la tagoj antaŭ KEF okazos la Akvofestivalo. Ĝi estas la plej granda kulturfestivalo en Svedio, en kiu "tuta Stokholmo transformiĝas al scenejo". Certe indas profiti de vojaĝo al KEF por ankaŭ pasigi kelkajn tagojn en la "Venecio de la Nordo"! Por tiu celo, la organiza teamo de KEF proponas antaŭfestivalon en Stokholmo de la 7a ĝis la 10a de aŭgusto.


Pliaj informoj pri KEF vi trovos je <http://www.esperanto.se/kef/> aŭ retpoŝte ĉe  
**Janko Luin**  
 Myggdalsvägen 123  
 135 42 Tyresö  
 tel. 08/712 8291  
 janko@esperanto.se

de kiu vi povas ankaŭ ricevi aliĝilon.

Lennart Persson

La KEF-teamo

## KRUCVORTA ENIGMO



### Horizontale

- 1 Pentrado
- 2 Donus ofere - Muzik-instrument'
- 3 Malkurbigitan
- 4 Havas ŝipo antaŭe - Korinklina
- 5 Parto de veturo - Teatraj'
- 6 Riskoplena ekskurs'
- 7 Labor' kun pasto - Asocio sen nacieco
- 8 Fino de fino - Ĉielkorpon
- 9 Plenstomaka
- 10 Malbonodori

### Vertikale

- A Karne - Dombestojn  
 B Proponan - Rune Joon  
 C Ŝovu la langon - Grenon  
 Ĉ Kirurgon  
 D Restaĵon - Mondparto mallonge  
 E Finaĵo de verbo - Trinkpropono  
 F Produktanta entrepren'  
 G Ritotabl' - Maloftan  
 Ĝ Juvelŝtono  
 H Plibeligi - Rifuzi

## SOLVO DE 98/1

|    | A | B | C | Ĉ | D | E | F | G | Ĝ | H |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1  | E | B | U | R | A | P | A | S | T |   |
| 2  | F | I | L | A | N | T | R | O | P | A |
| 3  | E | B | E | N | A | I | R | O | S |   |
| 4  | K | L |   |   | R | O | S | T | R | O |
| 5  | T | I | G | R | O | K | E | S | T |   |
| 6  | O | R | E |   | K | A | I | N |   |   |
| 7  | A | T | E | N | A | N | O | N | S | E |
| 8  | C | E | F |   | M | I | N | I | T | A |
| 9  | A | K | T | U | A | L | I | G | I | S |
| 10 | N | E | I | N | T |   | M | O | N | O |